# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-05 n-ro 376


# Usono ĉesis partopreni en Tutmonda Pakto pri Enmigrado



Ĉefo de UN urĝas partiojn de konflikto en Jemeno haltigi batalon

Trump vizitis Japanion

Eŭropa urbo eldomigos centon da milionuloj

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

## Demokratia Respubliko Kongo: laboro de la infanoj: la plej granda borso pri metaloj en la mondo, maltrankviliĝas pro la origino de la kobalto interŝanĝata en Londono
*Laboro de infanoj p. 03*

## Eŭropa urbo eldomigos centon da milionuloj
*Sociaj loĝejoj p. 04*

## Ĉefo de UN urĝas partiojn de konflikto en Jemeno haltigi batalon
*Obei internacian humanitaran leĝon p. 05*

## Usono ĉesis partopreni en Tutmonda Pakto pri Enmigrado
*En la pasinteco Usono malavare akceptis elmigrintojn el diversaj landoj de la mondo p. 05*

## Trump vizitis Japanion
*Abe povos detrui Japanion, sekvante agreseman politikon de Trump p. 06*

## Hodiaŭe
*László Benjámin; kaj Fungo p. 07*

# Demokratia Respubliko Kongo: laboro de la infanoj: la plej granda borso pri metaloj en la mondo maltrankviliĝas pro la origino de la kobalto interŝanĝata en Londono

Post la enmerkatigo de la kobalto malsupre de la kurzo, la *London Metal Exchange* (LME), ĉefa tutmonda loko pri interŝanĝoj de neferaj metaloj, lanĉas enketon pri la provizaj fontoj de la liverantoj. Ne citante ĝin, la institucio celas aparte ĉinan entreprenon ege ĉeestantan en Demokratia Respublika Kongo, el kie duono el la tutmonda kobalto devenas. (LME), kiu grupigas 80% el la tutmondaj kontraktoj, maltrankviliĝas pro la origino de la kobalto intertraktitaj ĉe tiu borso.



La respektinda 140-jara institucio esprimis alarmonas pri la nesufiĉa travidebleco de la provizaj ĉenoj: «Ni postulas, ke tiuj specifaj problemoj estu traktataj kadre de niaj nunaj klopodoj, kaj ni estas malpaciencaj kunlabori kun la merkato pri tiu grava temo», legeblas en korespondo de la LME, kiupostulas de siaj liverantoj, ke ili detaligu, antaŭ la 1-a de decembro, la manieron per kiu ili garantias la originon de la resursoj, kiujn ili interŝanĝas.

**DRK kore de la provizado**

Kio ĉefe trankviligas la Londonan borson, estas la demando pri la laboro de la infanoj. En la celo respondi al la monda kreskado de la elektraj veturiloj, la mendo de kobalto por la baterioj kreskis je 80% en daŭro de jaro. Notinde, ke duono de la tutmonda kobalto originas de Demokratia Respubliko Kongo, kie kvinoblo el la minoj laborigas infanojn.

Oficiale, neniu liveranto estas celita. Sed laŭ la *Financial Times*, la maltrankviliĝoj de la LME koncernas aparte la praktikojn de la ĉina entrepreno *Yantai Cash Industrial*, kiu ŝajne enmerkatigis kobalton kun malaltaj prezoj. Pridemandite de la brita ĵurnalo, la ĉina industriisto respondis: «Kelkaj el niaj klientoj petis de ni, ke ni esploru nian provizan ĉenon por kontroli, ĉu ĝi konsistigas problemon, koncerne la homajn rajtojn kaj la laboron de la infanoj (...) Ni komencis tiujn klopodojn».

Tamen, se malobservadoj estos malkovritaj, estas malfacile scii pri la konsekvencoj. La LME certigas, ke

agadoj estos plenumitaj okaze de «praktikoj malsuperaj al la normoj». Sed la *Financial Times* tamen memorigas, ke la borso ne havas – ankoraŭ – specifajn regulojn koncerne la provizadon.

**Kreskado de la bezonojje 1000%**

Meze de novembro, studaĵo de Amnestio Internacia jam raportis la produktan procezon de kobalto, deveninta de la Demokratia Respubliko Kongo. «La industriaj gigantoj ne sufiĉe klopodas, fronte al la akuzoj pri la laboro de la infanoj, en la provizaj ĉenoj de kobalto por la baterioj», asertas la NRO. *«Renault* kaj *Daimler* prezentas rezultojn aparte malbonajn», ĝi precizigas.

Kun la energia transiro, la mendo pri provizado de metaloj estos pli kaj pli akra. Laŭ la Monda Banko, la mendo de ŝtalo, aluminio, arĝento, plumbo, litio kaj aliaj materialoj eksplodos por respekti maksimuman plivarmiĝon ĝis 2°C. Kelkaj bezonoj povus kreski je 1000% en la venontaj jaroj, kun la celo provizi la sektorojn de stokado de elektro, kaj renoviĝantaj energioj.

Neniam Milito Inter Ni

---

# Eŭropa urbo eldomigos centon da milionuloj

Pasintsemajne la svisa urbo Zuriko aprobis leĝon kun nova regularo al sia programo pri sociaj loĝejoj, celante eviti ties misuzon kaj la ekskluzivon de kelkaj profitantoj, kiuj nuntempe ne bezonas tiun subvencion, ĉar ili enspezas pli da mono ol la mezuma enspezo de la loĝantaro. Eĉ oni konstatis, ke 132 milionuloj estis loĝantaj en tiaj sociaj domoj en la jaro 2014, kiam la urbodomo proponis la ĵus aprobitan leĝon, kaj nun ili estas eldomigotaj.



Laŭ la nova regularo, la "socia luanto" ne povas gajni pli ol kvaroblon de la luprezo, kaj se dum la loĝado la salajro de la profitanto plialtiĝos al sesoblo de la luprezo, tiam la registaro povos ordoni lian/ŝian transloĝiĝon. La loĝejo devas esti la ununura de la familio, kaj ĉiu-dujare la kontrakto estos reviziita por kontroli la enspezon de la loĝanto. Antaŭe ne ekzkzistis en la leĝo de tiu programo limo koncerne la enspezon de la profitanto. La novaj reguloj ekvalidos en 2018.

Laŭ la aŭtoritatoj, nuntempe 19% de la profitantoj ne kongruas kun la nova regularo, kaj la registaro helpos ilin je ilia transloĝiĝo dum la venontaj kvin jaroj.

Krom la konstruado de sociaj loĝejoj fare de la loka registaro, ekde 2011 ĉiuj privataj projektoj pri konstruado de domaro nepre rezervu trionon de la loĝejoj al tia socia programo. La luprezoj por sociaj loĝejoj en Zuriko estas inter 623 kaj 2,2 mil svisaj frankoj [monate].

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

# Ĉefo de UN urĝas partiojn de konflikto en Jemeno haltigi batalon

Ĝenerala Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj António GUTERRES, dimanĉe [03 dec 2017] esprimis gravan maltrankvilon pri pligraviĝo de la armita konflikto en Jemeno kaj urĝis ĉiujn ĝiajn de la konflikto tuj haltigi batalon.



En deklaro publikigita la proparolanto diris, ke GUTERRES esprimis sian gravan maltrankvilon pri la lastatempaj konfliktoj en la ĉefurbo Sanao kaj aliaj regionoj de Jemeno kaj vokis ĉiujn partiojn de la konflikto kunlabori kun la UN, rekomenci inkluzivan intertraktadon kaj serĉi politikan solvon por la konflikto.

La deklaro diris, ke la lastatempaj konfliktoj pliigis la suferon de la Jemena popolo. GUTERRES vokis ĉiujn partiojn de la konflikto obei internacian humanitaran leĝon, liveri oportunon al humanitara agado kaj certigi, ke la civiluloj estos sub la protekto kaj la vunditoj ricevos medicinan helpon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Usono ĉesis partopreni en Tutmonda Pakto pri Enmigrado

La Blanka Domo deklaris dimanĉe [03 dec 2017], ke Usono decidis fini sian partoprenon en la procezo de la UN por formuladoo de la Tutmonda Pakto pri Enmigrado, kiu eble subfosos ĝian suverenan rajton.



Ŝtata sekretario Rex TILLERSON diris en deklaro, "Usono ne povas subteni la procezon, kiu eble subfosos la suverenan rajton de Usono plenumi niajn leĝojn pri enmigrado kaj sekurigi niajn landlimojn."

Miroslav LAJČÁK, prezidanto de la 72-a Ĝenerala Asembleo de la UN, esprimis sian bedaŭron pri la decido de Usono. Deklaro publikigita de lia proparolanto diris, ke en la pasinteco Usono malavare akceptis elmigrintojn el diversaj landoj de la mondo, kaj hodiaŭ ĝi ankoraŭ estas la plej granda lando de enmigrintoj, tial estas tre grava la rolo de Usono en formulado de la Tutmonda Pakto pri Enmigrado.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Trump vizitis Japanion

La 5an de novembro la usona prezidento Donald Trump [trʌmp] vizitis Japanion en sia unua vojaĝo al Azio kiel prezidento. Sed li venis ne al la internacia flughaveno de Tokio, sed al la usona [aerarmea] bazo *Jokota* [ 横田飛行場 Yokota Hikōjō ] situanta en la gubernio Tokio, kaj la unua saluto okazis en la bazo al la usonaj soldatoj. Ĉu tio ne estas granda ofendo al Japanio? La Japana registaro tamen neniam kritikis lin pro tio.



Dum sia 3-taga restado en Japanio, li ludis golfon kun nia ĉefministro [Shinzō] Abe [ 安倍 晋三 abe ɕin(d)zoː] [abe ŝinzō], manĝis kune kaj amike diskutis pri diversaj temoj. Inter tiuj la korea afero estis la plej grava, ĉar nun Nord-Koreio posedas nukleajn armilojn kaj minacas Usonon.

En tiuj kunsidoj Trump diris, ke Usono havas ĉiujn elektojn sur la tablo, inkludante uzon de militforto kontraŭ Nord-Koreio. Kaj Abe 100-procente aprobis la sintenon de la prezidento. Li aldonis, ke «Interparolo por interparolo» estas tute senutila kaj nun estas tempo pli fortigi premon al Nord-Koreio. Sed lia aprobo de uzo de militforto tute kontraŭas nian Konstitucion. Artikolo 9 en ĝi jene deklaras:

**Artikolo 9**

*(1) Sincere aspirante internacian pacon bazitan sur justeco kaj ordo, la japana popolo por ĉiam rezignas militon kiel suverenan rajton de la regno kaj la minacon per armita forto aŭ la uzon de armita forto kiel rimedojn por solvi internaciajn konfliktojn.*
*(2) Por atingi la celon menciitan en la antaŭa paragrafo, tera, mara kaj aera armeoj aŭ aliaj militfortoj neniam estu tenataj. La rajto de militado de la Regno ne estas agnoskita.*

**Japanio ĉiel devas eviti militon**

Eĉ «interparolo por interparolo» estas grava. Dume la koncernataj landoj ne okazigas militon. Sed kiam Trump kaj Abe rifuzis interparolon kun Kim [Kim Jong-un 김정은 [kim tɕʌŋ.ɯn]], la gvidanto de Nord-Koreio, li ne havas alian elekton krom silenti aŭ militi. Kiam Usono minacas lin per armiloj, li eĉ havas rajton uzi sian militforton.

Se Usono atakos Nord-Koreion, Kim senprokraste atakos usonajn militbazojn en Japanio, certe unue bazojn en Okinavo, kaj momente Okinavo malaperos. La grandega Usono estas malproksima de tiu, do eĉ se tiu atakos ĝin per nukleaj armiloj, damaĝoj estos ne tiel grandaj, sed Japanio estas proksima kaj malgranda, tial eĉ malmodernaj misiloj kaj raketoj povos doni grandan damaĝon al ĝi, krome, se Nord-Koreio atakos nukleajn reaktorojn situantajn marborde de la Japana Maro, en kies alia flanko estas Nord-Koreio, Japanio fariĝos neloĝebla pro radioaktiveco. Eĉ se Japanio gardos sin per la plej modernaj usonaj armiloj, ĝi ne povos protekti sin perfekte.

Nukleaj centraloj laŭ la marbordo estas kvazaŭ atombomboj facile uzeblaj de

malamikoj. Por ataki ilin, nur bazukoj estos sufiĉaj. Nokte oni povas proksimiĝi al la nukleaj centraloj eĉ per simpla ŝipo kaj povas facile detrui ilin. Dum Japanio posedas nukleajn centralojn, ĝi neniam venkos en milito. Tial Japanio devas ĉiel eviti militon. Subteno de ABE al TRUMP signifas eblan pereon de Japanio. Multaj homoj tre timas tion, kaj strevas forpeli ABE-on de sia posteno.


**Ĉu la regantoj estas komercistoj?**

TRUMP postulis, ke Japanio aĉetu kvantegon da usonaj armiloj por la usona ekonomio. Kaj ABE tuj promesis tion. Jam du monatojn antaŭe la japana ministro pri eksteraj aferoj promesis aĉeti du "*Aegis Ashore*"-ojn, kiuj kontraŭbatalas nordkoreajn misilojn de sur tero, ne de la ŝipoj. Ili kostas entute 160 miliardojn da enoj (1,6 miliardojn da eŭroj). En la kunsido kun TRUMP, ABE promesis aĉeton de multekostaj *Stelth-Airkraft*-oj, kiuj povas, duone sin kaŝante kontraŭ radaro, ataki aŭ bombardi malamikojn. Se ABE uzus tiom da mono por bonfarto de la popolanoj, kiel feliĉaj ili estus! Aĉeto de armiloj tute ne donas feliĉon al la popolanoj, male detruon al ili.

Eksa prezidento OBAMA ne multe sukcesis disvastigi pacon en la mondo, sed liaj prelegoj estas filozofiaj kaj aŭskultindaj. Kompare kun li, kiel malaltnivela estas TRUMP, kaj same, kiel malaltnivela estas nia ĉefministro ABE! Ili devus gvidi la mondon en pacon, sed ili nur agitas la mondon al milito. ABE povos detrui Japanion, sekvante agreseman politikon de TRUMP.

La japanoj estas tre obeemaj kaj modestaj, tial bedaŭrinde en Japanio ne multe okazis manifestacioj kontraŭ TRUMP, sed en Koreio okazis grandaj manifestacioj. Ankaŭ en Filipinoj okazis grandaj manifestacioj.

HORI Jasuo



## László BENJÁMIN

**László BENJÁMIN, [lAslO benjAmin], hungare BENJÁMIN László, Esperante Ladislao BENJAMIN estis hungara poeto kaj politikisto. Naskiĝis la 5-an de decembro 1915 en Budapeŝto. Mortis la 18-an de aŭgusto 1986 en Budapeŝto.**

**En Esperanto aperis poemoj en *Hungara Antologio*.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**«Frukto» de la fungo *Cyttaria hariotii*.**

**Vikipedio**